

# HEROLDO

Eldono : Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstraat 3, Brussel-West.  
Redakcio-Administracio : T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.  
Jarabono : Belgujo 165 fl., Nederlando 9 gld. ; cetero laŭ aparta tarifo.  
(Abonantoj por 1948 ricevas premie la numerojn de okt.-decembro 1947.)  
Anoncoj : 25 komencitaj vortoj b. fl. 25.—, gld. 1.25 aŭ 6 resp.-kuponoj.

## DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 16 (1075)

FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO

15 Oktobro 1947

### Por krei mondon sen milito

Movado por Federacia Mondregistaro  
Kongreso en Montreux (17-24 Aŭgusto 1947)

Pli ol 200 delegitoj el 15 landoj kunvenis en Montreux por interŝanĝi ideojn kaj trovi vojon por kunlaboro por la alta celo krei mondon, en kiu milito estos elŝaltita kiel rimedo solvi konfliktojn.

La Universala Ligo estis reprezentita de *Andreo Cseh* kaj *Julia Isbrucker*, kiu samtempe reprezentis la Universalan Esperanto-Asociacion.

Dum la solena malferma kunsido, vizitita ankaŭ de ne-kongresanoj, D-ro *M. Habicht*, prezidanto de la provizora konsilantaro, kaj *H. Usborne*, membro de la brita parlamento, faris impresajn paroladojn. La kongreslingvoj estis franca kaj angla, kaj ni denove spertis la grandan malavantaĝon, kvankam la profesia tradukistino brile tradukis ĉion. Sed la atmosfero dum la paroladoj multe suferis pro tio, ke ĉiam parto de la publiko ne komprenas la parolanton, komencas flustri inter si aŭ forlasas la salonon. La edifa sento, ke amaso de diversnaciaj personoj komune aŭskultas kaj komprenas entuziasman parolanton, tute mankis kiel preneble.

Inter la salutleteroj la sekretario, s-ro *Tom Griessemmer*, laŭtlegis mesaĝon de UEA kaj aldonis, ke ĵus okazis impresa kongreso de la esperantistoj en Bern.

Ceestis diversaj esperantistoj el sep landoj, kiuj kune reprezentis 35.000 samideanojn. Nur tiuj asocioj, kiuj aliĝis al la Movado por Federacia Mondregistaro, rajtis raporti kaj voĉdoni. Univ. Ligo jam antaŭe aliĝis kaj havis 9 voĉojn. *Andreo Cseh* raportis pri U. L. kaj faris tion laŭ sia kutimo en Esperanto. Granda surprizo ĉe la estraro kaj kongresanaro, sed oni aŭskultis atente, kaj grandparte komprenis. La tradukistino estis iom embarasita, sed s-ino *Isbrucker* tuj lasis sekvi la tradukon en franca kaj angla lingvoj.

La klara kaj mallonga parolado en Esperanto vekis grandan intereson, kaj precipe la monsystemo de U. L. elligis multajn demandojn post la kunveno.

Estis surpriza fakto, ke en la programo de la Itala Federacia Movado (Movimento Unionista Italiano) kiel

\*\*\*\*\*

#### VERDSTELAJ RADIOJ.

— La urbestro de *Perpignan* (Francujo) decidis subvencii la lokan Esp.-movadon per 5000 frankoj. Bela strato inter la poŝto kaj komercaj oficejoj en tiu urbo nomiĝas *Strato de l' Doktoro Zamenhof, kreinto de Esperanto*.

— Dum la *Junulara Mondfestivalo en Praha*, kiun vizitis ankaŭ esperantistoj el 12 ŝtatoj, 1200 aŭtoroj en la urbo atentigis pri Esperanto. En granda procesio dum la solena fermo de la festivalo estis portata, egalrajte kun flagoj de la tuta mondo, ankaŭ *Esperanta flago*, sub kiu marŝis 74 gejunuloj.

— Speciala *Esperanto-poŝtstampa* estis aplikita okaze de la *Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Kongreso en Krefeld* (Germ.) la 13.-15.9. La kongreson partoprenis ĉ. 350 gesamideanoj.

— La 30-a Jubilea Esperanto-Kongreso de *Bulgara Esperanto-Asocio* okazis la 6.-8.9. dum la Int. Foiro en *Plovdiv*.

— En *Cengcheng* (Ĉinujo) s-ro *Liu Hongkang* komencis Esp.-kurson por gimnazianoj. En *Hongkong* restariĝis Esperanto-asocio.

unu el la punktoj troviĝas la enkonduko de Esperanto. Komprenable ni tuj serĉis kontakton kun la gvidanto de la itala delegitaro, Prof. *Ugo Damiani*, parlamentano, kiu montris grandan intereson en la labormaniero de U. L.

Estis aparta komisiono por la rezolucioj. Ankaŭ U. L. transdonis rezolucion pri Esperanto. La intenco estis, ke en la lasta kunsido tiuj rezolucioj estos voĉdonataj. Kiam alvenis la lasta kunveno, evidentigis, ke la programo estis tiel plena, ke neniu rezolucio povis esti pritraktata, tiel ke la kompatinda komisiono post multhora laboro devis teni la rezoluciojn en la dika akto.

La ĉefa laboro estis la pritraktado de la statutoj, kiuj nun estas fiksitaj. En la vesperoj okazis interesaj paroladoj kun debatoj pri Rusujo, Germanujo, Nürnberg ktp.

En la kongreso ankaŭ partoprenis la Eŭropaj Federalistoj, kiuj opinias, ke regionaj federacioj devos esti la bazo de la mondfederacio, dum la mondfederalistoj estas konvinkitaj, ke oni devos komenci per mondfederacio kaj poste formi regionajn federaciojn. La kunlaboro estis tre bona, ĉar la fina celo estas por ambaŭ la sama. (La eŭropaj federalistoj daŭrigis sian laboron en la semajno post la mondfederalista kongreso, ankaŭ en Montreux.)

En la ferma kunsido la sekvanta deklaro estis unuanime akceptata:

#### Deklaracio de Montreux.

Ni, mondfederalistoj, kunvenintaj en Montreux en la unua internacia kongreso de la Mondmovado por Federacia Mondregistaro, alvokas la popolojn de la mondo por partopreni en nia laboro.

Ni estas konvinkitaj, ke la homaro ne povos transvivi alian mondan konflikton.

Du jaroj pasis post la fino de la bataloj, sed Eŭropo kaj Azio ankoraŭ estas plenkovritaj de la ruinoj kaj ruboj, kiujn postlasis la milito.

La rekonstrua laboro estas lamigita; la popoloj suferas pro manko de loĝejoj, nutraĵoj kaj vestaĵoj, dum la nacioj misuzas siajn materialojn por prepari la reciprokajn detruojn.

La dua provo, por konservi pacon per la mondorganizaĵo de la Unuigintaj Nacioj, estas senefika en la nuna formo kaj ne povos malebligi novan militon.

Ni, mondfederalistoj, estas konvinkitaj, ke la formado de federacia mondparlamento estas la ĉefa problemo de nia tempo. Antaŭ la efektiviĝo de tia parlamento ĉiuj aliaj problemoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj, restos nesolveblaj.

La elekto ne estas inter libera entreprenado kaj planita ekonomio, nek inter kapitalismo kaj komunismo, sed inter federalismo kaj potencpolitiko. Nur federalismo povos garanti la pluan ekzistadon de la homaro.


Ni, mondfederalistoj, deklaras, ke la homaro povas por ĉiam liberigi sin de milito per la starigo de federacia mondfederacio. Tia federacio devos esti bazita sur la sekvantaj principoj:

1. *Universala membreco*: Ĉiuj popoloj kaj nacioj havas la rajton partopreni en la federacia mondfederacio.

2. *Limigi la naciagan suverenecon kaj transdoni al la federacia mondfederacio tiujn leĝojn, plenumajn kaj jurajn potencojn, kiuj rilatas al mondaferoj.*

3. *Devigi al obo al la mondleĝo ĉiun individuan, kiu ajn li estas aŭ kie ajn li troviĝas en la regiono de la federacia mondfederacio; garanti la homajn rajtojn kaj subpremi ĉiujn klopodojn kontraŭ la sekureco de la federacio.*

4. *Krei supernacian armeon, kiu estas kapabla garanti la sekurecon de la federacia mondfederacio kaj de ĝiaj membroj.*



La Esperanto-Monumento en Bergen-op-Zoom.

En la pasinta numero ni raportis pri la inaŭguro de nova memortabulo sur la Esperanto-monumento en Bergen-op-Zoom. La ĉi-supra bildo prezentas la monumenton dum la inaŭgura ceremonio.

### Jamboreo de l'Paco

Esperanto ne estis forgesita.

La unua postmilita jamboreo okazis en Francujo de la 9-a ĝis la 23-a de aŭgusto. Ĝi estis, oni povas diri sen emfazi, granda sukceso.

La elektita loko, inter Paris kaj Rouen, apud la Seine, estis vere alloga en la arbaro de *Moisson*. La tereno estas granda, sufiĉe alta ebenaĵo, preter kiu kuras cirkle la bela rivero. La arbaro etendiĝas sur

ŝtatoj. Senarmigo de la membro-nacioj ĝis la mezuro de la interna, polica bezono.

5. La federacia mondfederacio devos posedi kaj kontroli la atom-evoluon kaj aliajn sciencajn eltrovaĵojn, kiuj povos kaŭzi amasajn detruojn.

6. Povo postuli por si apartajn impostojn rekte kaj sendepende de la ŝtataj impostoj.

Ni intencas uzi ĉiujn eblajn metodojn, kiuj povas akceli la kiel eble plej baldaŭan kreigon de federacia mondfederacio por eviti novan mondmiliton.

Ni konsideras, ke kunordigo de aktivaj fortoj, laborantaj sur regiona nivelo, estas necesa por la federacia laboro. La formado de regionaj federacioj, se ili almenaŭ ne estas rigardataj kiel fincelo aŭ transformataj en blokojn, povas kaj devas kontribui al efektiva funkciado de federacia mondfederacio. Same la solvo de teknikaj, sciencaj kaj kulturaj problemoj, kiuj koncernas ĉiujn popolojn de la mondo, estos trovata pli facile per la kreado de specialaj tiurilataj organoj.

Konsiderante ĉi tiujn principojn, ni rekomendas la sekvantan laborprogramon:

1. *Mobilizi la popolojn de la mondo por instigi siajn registarojn kaj parlamentojn, transformi la organizaĵojn de la Unuigintaj Nacioj en federacian mondfederacion kun pli da aŭtoritato kaj pli da rimedoj kaj kun revizita ĉarto.*

2. *Neoficiale organizita agado: Precipe la preparado de tutmonda konstitua komisiono, organizota de la Konsilantaro de la Movado por Federacia Mondregistaro, en intima kunlaboro kun la parlamentaj grupoj kaj federaciaj movadoj en la diversaj landoj. Ĉi tiu komisiono, formota en kunlaboro kun organizitaj, internaciaj grupoj, devos kunveni ne pli malfrue ol en 1950 kun la celo ellabori konstitucion por la federacia mondfederacio. Ĉi tiu konstitucio estos prezentata ne nur al la registaroj kaj parlamentoj por ratifiko, sed ankaŭ al la popoloj mem, kaj ĉiu ebla klopodo estos farata por kiel eble plej baldaŭ starigi la federacian mondfederacion.*

Ne diskutante pri la ebla rezulto de tiuj du labormetodoj, ni devos senprokraste komenci nian agadon, tiel ke ni povu profiti de ĉiu nova ebleco akceli la federalistan movadon. Unu afero estas certa: ni neniam realigos la federacian mondfederacion, se ne ĉiuj popoloj de la mondo partoprenos en la agado.

Pli ol iam la tempo urĝas. Kaj nun ni ne rajtas malsukcesi!

multaj hektaroj el sabla grundo, sub kiu troviĝas, malprofunde, argilo.

Antaŭ ol eniri la tendaron, aŭ kiam oni eliras, oni vidas la montetojn lokitajn sur la alia flanko de la Seine kun iliaj blankaj klifoj kiuj falas abrupte, super kiuj estas la mezepoka kastelo de la *Roche Guyon*. Ĝi havas historion; sed mankas ĉi tie la loko por ĝin priskribi...

Trapasante *Rosny-sur-Seine*, laŭlonge de la bela parko de l' kastelo, la ŝoseo estas gardata de ŝtatpolico kaj de skolta ŝosepolico, la tendoj de la skoltoj troviĝas apud la vojo. La ŝosepolico estas perfekta kaj impona. Tio estas necesa, ĉar la jamboreo okazigis grandan trafikon.

En *Rolleboise* la ŝoseo supreniras rapide en mirinda pejzaĝo konsistanta el la tute verdaj montetoj kaj la Seine ĉe ilia bazo. Sur la supra ebenaĵo oni devas iri sufiĉe multajn kilometrojn tra ordinara kamparo kiu permesas, tamen, vidi ĉe la fundo la panoramon de la aliflankaj montetoj.

Fine oni alvenas ĉe la arbaro, kaj tie estas la majesta enirejo de la Jamboreo de l' Paco.

Tuj oni droniĝas en la vivon de la tendaro. Ĉiuj enirejoj estas gardataj de skoltoj kiuj severe, sed ĝentile, plenumas veran policon. Tio permesas al ni senti tuj ke ordo regas en la tola urbo.

La granda centra avenuo estas nomata *Allée des Nations* (Aleo de la Nacioj) por honori la diversajn naciojn kiuj partoprenas la jamboreon. Ĉe la komenco troviĝas granda terglobo, simbolo de la universaleco de l' skoltismo, kaj ĉe la fino estas la ĉefloko kun la *Areno*, kie okazas la gravaj komunaj festoj kaj la naciaj elmontradoj. Apude oni trovas la centran merkaton kun la poŝtoficejo, la transportdomo, la diversaj vendejoj. La ĝenerala ĉefkvartalo estas je la maldekstra flanko kun multe da tendoj, en kiuj troviĝas la diversaj estraj servoj.

Fine, tra la grandega arbaro, estas multaj subtendaroj kiuj ricevis

#### Lastmomente antaŭ la preso

de ĉi tiu numero ni eksciis ke la poŝto fine akceptas presadojn por la *usona zono de Germanujo*; sekve ni povas nun liveri *Heroldon* al la abonintoj de tiu zono. Bedaŭrinde elĉerpigis intertempe pluraj numeroj de la nuna jarkolekto; anstataŭe ni liveros ekzemplerojn de la pasintjara kolekto.

**Honto!**

Patro kaj fratoj mortvigitaj; patrino, fratinoj cindrigitaj. Parencoj, amikoj — kien malaperis? Milionoj turmentitaj kaj murditaj en germanaj koncentrejoj. Tra tuta Eŭropo: malestimo, ofendoj, persekutoj, poŝtomoj. Jen kiam postvivantoj sopiras konstrui propran hejmon. En lando kie antaŭ jarmiloj la prapatroj loĝis. Sed la eniro en la Benatan Landon restas barita. Returne! returne! En — germanan koncentrejon.

Du Berlinaj esperantistoj sukcesis veni al Bern. La Verda Oazo en mondo ruinigita kaj konfuzita. Pli ol dek jarojn ili estis soifantoj en dezerto. Pli ol dek jarojn al ili estis malpermesite uzi Esperanton. Obstaklo amasiĝis sur ilia vojo, sed sopiro al kunestado en samideana rondo igis ilin venki ĉiujn barojn. Ili venis kaj — estis malhelpataj paroli. Pli ol du jarojn post militfino.

Tuthomara kaj samideana solidareco? Ne: honto!

URTIKO.

la nomojn de la ĉefaj francaj provincoj. La diversnaciaj delegitaroj estas dispartigitaj tra la provincaj sub-tendaroj.

Por faciligi la transiradon, fervojo je mallarĝa trako (interspaco de l' reloj) rondiras laŭ ok kilometroj da vojoj, en senfina cirkla vojaĝo.

La diversaj francaj publikservoj grave helpis la organizadon de la tendaro. Sosejoj estas plibonigitaj kaj ampleksigitaj; akvo estas disdonata tra la tuta arbaro per multaj kanaletoj. La francaj fervojoj konstruis specialan stacidomon en Rosny-sur-Seine, kaj el ĝi la vizitantoj estas kondukataj per aŭtobusoj al la ĵamboreo. En la tendaro mem la fervojoj havas specialan servon en la transportdomo, PTT havas dekdu-giĉetan oficejon kaj specialan telefoncentron, centoj da kilometroj da dratoj trairas la arbaron. La franca armeo kunhelpis, pruntedonante materialon; ankaŭ la militŝiparo, ĉar la nordafrikaj skoltoj venis Francujon per militŝipo.

En tiu ĉi ĵamboreo de l'Paco Esperanto ne estis forgesita. Cetere la kreinto de l' skoltismo, Lord Baden Powell, konsilis al la skoltoj lerni Esperanton. Verdire oni povas aserti ke la idealoj de l' skoltismo kaj de l' Esperantismo havas komunan punkton: interkonatiĝo de la diversaj popoloj. Skoltismo alportas sian profundan, fratecan emon al Paco, kaj Esperanto donas al ĝi la necesan ilon.

En la alvok-broŝuro eldonita de la ĵamborea komitato estas uzitaj tri lingvoj: la franca, angla kaj Esperanto. Ekde la komenco Generalo Lafont, ĉefo de la Franca Skoltismo, salutante la skoltojn alilandajn kaj francajn, diris fine de sia artikolo en la tagĵurnalo de la tendaro, *Jamborée France*: « Vi estas tie por interkonatiĝi; se vi ne estas interpretisto, se vi ne scipovas Esperanton, uzu la gestan lingvon! » La helpo de Esperanto tiel estas klare montrita.

Plie, la Poŝtadministracio uzis dum la ĵamboreo specialajn avizilojn por alvoki la adresatojn al la poŝtejo; ili estis redaktitaj trilingve: france, angle kaj esperante. Ankaŭ la tarifoj de la ŝuriparejoj estis afiŝitaj en tiuj tri lingvoj. Tio estas vere nova vojo menciinda, kaj imitinda aliloke.

Fine, la plej granda Esperanta afero estis la Kongreso de la Esperantistaj Skoltoj, kiu okazis dimanĉon la 10-an de aŭgusto en la ĉefkvartala tendaro, sub belaj kverkoj.

Ĉi-loke ni deziras publike danki D-ron Couteaux, bone konatan francan esperantiston, kiu dum multaj monatoj antaŭ la ĵamboreo laboris, por ke Esperanto estu en la monda kunveno. Li verkis specialan lernolibron por la francaj skoltoj. Liaj penadoj trovis ehojn, kaj la ĵamboreo vidis la sukceson de liaj klopodoj. La francaj esperantistaj skoltoj danke nomis lin Honora Prezidanto de sia nacia ligo.

R.F.

Rim. de red. — Aldonitan raporton pri la Kongreso de Skolta Esperanta Ligo ni devis prokrasti; se la loko permesos, ni publikigos ĝin en la sekvonta numero.

**Ĉu malpermeso en la rusa zono?**

De diversaj flankoj oni sciigis ke la Esp.-movado estas malpermesita en la rusa zono de Germanujo. Samideano el Berlino informis nin (dato 6.7.1947) ke « la famo pri la malpermeso de la Esp.-movado en orient-germana zono estas limigita nur je kelkaj distriktoj ».


**UNIVERSALA LIGO.**

*Informoj por la membroj.*

**Statuto.** — La statuto de la Universala Ligo la 10-an de julio 1947 ricevis la registaran aprobon. La dokumento estas subskribita de la nederlanda reĝino Vilhelmino kaj de s-ro J. H. van Maarseveen, ministro de justeco. La teksto de la statuto aperos en la almanako de UL.

**Faka kunsido en Bern.** — Dum la Universala Esperanto-Kongreso en Bern inter la diversaj fakaj kunsidoj okazis ankaŭ aparta kunveno de la Universala Ligo, la 30-an de julio, por membroj kaj interesgantoj. Anstataŭ la ligo prezidanto Prof. D-ro Edmond Privat, kiu pro ĵusa trapaso de grava operacio ne povis ĉeesti, prezidis s-ino Julia Isbrucker, vicprez de UL. La grandnombra publiko aŭdis paroladon de s-ino Isbrucker pri la movado por mondfederacio kaj paroladon de s-ro Andreo Cseh, sekretario de UL, pri la Ligo mem, ĝiaj principoj kaj laboroj. Post la paroladoj multaj personoj el diversaj landoj faris demandojn kaj sugestojn, kaj oni kolektis multajn aligojn. Ĉe la prezida tablo sidis ankaŭ s-ro P. L. Wright, estrarano de UL kaj reprezentanto por Britujo, s-ino Luise Riedle, repr. de UL por Svislando, kaj s-ro Dolfa Bartošik, repr. de UL por Ĉeĥoslovakio. Inter la ĉeestantoj partoprenis ankaŭ s-ro generalo L. Bastien, ĝisnuna prez. de IEL, s-ro E. Malmgren, nova prez. de UEA, s-ino Wanda Zamenhof, bofilino de la aŭtoro de Esperanto, s-ro T. O. Griessemmer, ĝen. sekr. de la Movado por Mondfederacio, kaj multaj gvidantaj personoj el la Esperanto-movado. La kunsido de UL akceptis rezolucion prezentatan al la Federalista Kongreso en Montreux en la favoro de Esp. **Generala kunveno.** — La estraro de UL fiksas la daton de la proksima ĝenerala kunveno de UL por la 10-a de aprilo 1948 en Hago. La ejo kaj horo de la kunveno estos poste publikigitaj.

CENTRA OFICEJO DE UL.



S-ano Robert Robertson.

Ni ne scias, ĉu tio estas la unua fojo; sed certe malofte okazas ke esperantistaj geedzoj povas festi sian diamantan (60-jaran) geedzan jubileon. La jubileuloj estis ges-roj Robertson en Londono (la edzo 86-, la edzino 83-jara); la granda festo okazis la 10-an de septembro, en la celeburo helpe pli ol 50 vizitantoj, multaj telegramoj (unu de liaj mostoj la Reĝo kaj Reĝino, alia de la urbestro) kaj eĉ pli multaj leteroj kaj gratulkartoj. Pluraj ĵurnaloj publikigis pri la jubileo, menciante la multjaraĵon dediĉon de s-ro Robertson al la Esperanto-movado. S-ro Robert Robertson estas konata kiel prezidinto de Brita Esp.-Asocio, prezidanto de la eldonejo « Esperanto Publishing Co. » kaj de « Denaska Esperantistaro ». Li vizitis 13 universalajn kongresojn kaj havas amikojn tra la tuta mondo. S-ro Robertson ankaŭ dekomence estas amiko de Heroldo, kies dumviva abonanto kaj subtenanto li fariĝis. Al la bonkora, simpatia kaj ĉiam bonhumora jubileulo kaj lia kara edzino ni deziras ankorau multajn jarojn da feliĉa kunvivado.

**Reklamo por Basic English kaŭzis florantan Esperanto-vivon**

en kelkaj urboj de la usona ŝtato Oregon: « Dum tridek jaroj mi ne uzis Esperanton » (skribis al ni s-ano J. M. Clifford, kiu antaŭ multaj jaroj fondis kaj dum dek jaroj prezidis la Esp.-societon en Pittsburgh, kaj kiu poste loĝis en la kamparo, kie li ne havis okazon por uzi nian lingvon) « sed kiam oni komencis reklami pri Basic English, mi decidis ke estas matura tempo por rekomenci laboron por nia kara afero. » La rezulto de tiu laboro estis kursoj en Portland kun 29 p. kaj en Corvallis kun 21 p., kaj la fondo de kluboj en ambaŭ urboj. Kredeble intertempe jam komenciĝis novaj kursoj. Ĉi tiuj estas oficialaj kursoj de la ŝtato Oregon.

**Nia movado en Egiptujo**

revigliĝas. Egipta Esp.-Asocio kontaktis la ministerion de Edukado kaj tiun de Sociaj Aferoj kaj klopodas ke la ministerio subvenciu nian movadon kiel ĉiujn aliajn klerigajn asociojn en la lando. En *Kafr el Daŭer* juna samideano Moh. Ali Ŝerif vicle propagandas inter la skoltoj de la kompanio Misr, kie li laboras. Li publikigis longan artikolon pri Skoltismo kaj Esperanto en la bele presita skolta revuo araba « Al Naŝra al Kaŝfia ».

**Kiun lingvon oni parolas en la ĉielo?**

En nia redakcia kstaro troviĝas multaj interesaj manuskriptoj, kiujn ni publikigos iom post iom en venontaj numeroj. Ili temas pri diversaj aferoj: pri la moderna Golemo, pri la araba preslitteraro, pri la taŭgeco de la spiritaĵoj fundamentoj de nia kulturo, pri la lingvo parolata en la ĉielo, ktp. Bonvolu noti ke en la nunaj cirkonstancoj ni en Heroldo ne havas lokon por simplaj klubkomunikoj.

**Esperanta somero en Nederlando.**

Malofte en antaŭaj jaroj trasonis Esperanto la « Malaltajn Landojn » tiom multvoĉe kiom dum la ĵus pasinta somero. Tri grandstilaj propagand-arangoj en Amsterdam, Groningen kaj Eindhoven, kunlabore organizitaj de la kvar diverstendencaj Esperanto-asocioj; inaŭguro de memortabulo sur la Esperanto-monumento en Bergen op Zoom; Esperanto-semajno en Zaandam, kiu pro ĉeesto de multaj eksterlandaj gastoj fariĝis vera miniatura kongreso internacia; prelegvojaĝo de ĉeĥa laboristo de Skoda-uzinoj, k-do Peleman; feriaz kursoj de LEEN en Kerk-Avezaath; vizito kaj trapaso de multaj samideanoj, eĉ tutaj karavanoj alilandaj: francaj, belgaj, danaj, svedaj, norvega, britaj, hungaraj ktp. En Hago s-ano Valckenier havis plenan salondon la 20.9., kiam li unuafoje prezentis siajn ĉarmajn « Najtingaletojn » (infanĥoron) kaj jam konatan sinjorinan ĥoron « La Nova Mondo »; la 21.9. okazis ekskurso al Scheveningen; la 22.9. propaganda fest-vespero de la LEEN-sekcio kun bon sukcesa prezentado de kostumita sinjorina ĥoro, teatraĵo ktp.; la 23.9. montris Univ. Ligo kvar Esp.-parolantajn filmojn pri la detruo kaj rekonstruo de Nederlando kaj Budapeŝt — malgraŭ pluvvetero la salono estis plena, ĉeestis eminentaj personoj, kaj la publiko estis entuziasma; la 24.9. propagand-vespero de laboristaj esperantistoj en la Popola Domo; fine ankoraŭ propagand-prelegoj de konataj diversurbaj esperantistoj; do, preskaŭ ĉiutage io alia. Okaze de la 250-jara ekzistado de « poldera » komunumo Zijpe la LEEN-sekcio partoprenis per Esp.-stano en 4-taga ekspozicio. Fine, en Arnhem, la 4.10. estis inaŭgurata nova memortabulo por la Esperanto-Aleo. Tro multe da « eventoj » por paroli detale pri ĉiu unuopa el ili; sed ni volas esperi, ke la fruktoj montriĝos dum la vintro. Ankaŭ Radio montras pli grandan intereson por nia afero. (Vidu sub la Radio-rubriko.)

**Tiel Esperanto bonege servas.**

Anna Alamo el Stokholmo kaj D-ro A. Baur kun edzino el Berno efektiviĝis en Ĉeĥoslovakio dum la nuna somero tre sukcesajn prelegvojaĝojn. La intereso de la publiko estis nekutime granda malgraŭ la varmega somero. Nacilingvaj ĵurnaloj raportis ofte kaj favore. Anna Alamo faris pli ol 50 prelegojn; interalie ŝi parolis el urbdoma balkono en sudĉeĥa urbo al 10 000 gestudentoj. D-ro Baur prelegis pri Svislando (kun filmoj), inter la 18.8. kaj 9.9., en 11 urboj (Praha, Kladno, Brno, Prostějov, Ostrava, Olomouc, Hradec Králové, Trutnov, Doksy, Liberec kaj Osti n.L.); la prelegojn ĉeestis inter 70 kaj 210 personoj.

La konata s-ano Josef Vitek el Hradec Králové, kiu prelegis pasintjare 5 monatojn en Svedlando, denove forveturis por prelegi en Danlando, Norvegujo, Islando, Finnlando kaj Svedujo. Alia ĉeĥo, k-do Peleman, vizitis nunsomere diversajn landojn kaj prelegis precipe en laboristaj rondo.

**Esperanto-novaĵoj el Hungarujo.**

Okaze de la hungaraj parlament-elektoj estis aranĝita *esperantilingva elekto-kunveno* por la Socialdemokrata Partio, verŝajne la unua tia en la historio; la varbparoladon faris Prof. L. Kökény.

« En ĉiu grava stacio de Hungarujo estu almenaŭ unu fervojisto, kiu scias Esperanton! » Jen la celo, por kiu la *Hungaraj Statfervojoj* je propra kosto sendis en septembro sepdekono da fervoj-oficistoj el ĉiuj partoj de la lando al urbeto Keszthely, por partopreni unumonatan Esperanto-kurson.

La 7.9. okazis en pilgrimejo Maria Remete apud Budapeŝt la unua *katolika meso* post la milito kun esperantlingvaj prediko kaj kantoj; la predikon diris juna monaĥo P. Nikolao M. Boglari.

La *oficialaj kursoj* aranĝitaj laŭ ordono de la urbestro de Budapeŝt en la Pedagogia Instituto finiĝis kun 30 partoprenintaj instruistoj kun neatendite bona sukceso; espreble la eks-kursanoj povos en aŭtuno instrui Esperanton en ĉefurbaj lernejoj.

La *urbestrino de Pécs*, s-ino J. Tolnay, partoprenas Esp.-kurson por virinoj.

La Komitato de la *Sanigbanejoj* de Budapeŝt, V., Molotov-tér 3, preparas Esperantan prospekton. Petu multnombre!

**Ni memoru niajn mortintojn.**

Vasil Benĉev Vasilev, malnova pioniro el Vraca, Bulgario, kunlerninto de Ivan Krestanov, mortis la 22.7.1947, kiel direktorofondinto de parfumlaboro en Sofia. Alia konata bulgara samideano, D-ro Panajot Hitrov, kuracisto, 54-jara, estis mortigita 1945 en Skopje (Makedonio); ankaŭ mortigita estis samjare gimn. instruisto Georgi Jazaĝiev, malnova esperantisto, en Silistria (Dobruĝo).

Fidela batalinto por nia afero mortis la 7.9. en Brno, Ĉeĥoslovakio: malnova pioniro Karlo Steyer. Naskiĝis 31.5.1886 en Brno, kie komence de la jarcento li kunfondis Esp.-klubon. 42 jarojn li laboris por Esperanto, plejparte en Germanujo, estis eldonisto, kompilis vortaron, gvidis kursojn kaj fine loĝis en Tabarz Th. Por sia Esp.-laboro li fariĝis viktimo de la nazi-reĝimo. En malliberejo li grave ekmalŝanis kaj revenis post la milito en sian patrujon kun difektita sano. Antaŭ la morto li mem fiksus verdstelan insignon sur sian mortoveston. Sur lasta vojo lin adiaŭis lokaj esperantistoj, kaj florkrono kun surskribo en Esperanto ornamis lian ĉerkon.

La 12.7. pereis por trafikakcidento s-ano E. W. Pijlman en Amsterdam, membro de la laborista asocio.

Por eterne forlasis nin ankaŭ irlanda s-ano pastro J. A. Bain, jam la 21.2.1947.

La 2.8. forpasis s-ano R. J. Verth, dum multaj jaroj viĉdel. de UEA en Edinburgh.

La 31.8. mortis nia abonanto s-ano R. Schroevers en Vlissingen, Nederlando.



**Militkaptito kiel propagandisto.**

Longan tempon devis nia samideano Rosner kiel militkaptito restadi en Helenujo (Greklando). Sed li ne estus « Esperanto-Rosner » (kiel li mem sin nomas), se ankaŭ kiel militkaptito li ne uzus ĉiun okazon por propagandi nian lingvon. La foto montras lin en lia « Esperanto-uniformo », kun verda stelo surbrake kaj kun Heroldo en la mano, antaŭ la poŝtoficejo en Glifado, kun la poŝtisto s-ro Papadakis, kiu lernis Esperanton de li.

S-ano Rosner rakontas ke en Italujo Esperanto foje savis al li la vivon. En Greklando li akiris diplomon de la Helena Esperanto-Instituto en Ateno. Pasintan Kristnaskon li kolektis en la tendaro de la militkaptitoj 120 subskribojn por la Petskribo al UNO. Antaŭ nelonge li povis veni al sia hejmo kaj familio en la Erz-montaro (Germanujo), sed dumvoje de Pireo al Cuxhaven sur la ŝipo « Colorado Springs Victory » la 14.4.47 la laŭtparolilo invitis la 1200 repatruiĝintojn al venontaga Esperanto-ekspozicio kaj parolado de k-do Rosner.

Nun la fervora propagandisto laboras kiel observisto de transportbendo en subtera minejo. Li kaj lia familio ne fartas bone: la malsatfantomo ĉirkaŭvagas. Kiu ĝojigos lin per paketo? (Li mem tian ne petis sed ni kredas ke li meritas ĝin.) Adreso: Esperanto-Rosner, Lugauerstr. 87, (10 b) Oelsnitz, Erzgeb., rusa zono, Germanujo.

**Por kelkaj tagoj la « kalorioroj » tre altiĝis.**

Sed tio ne estis la ĉefafero. S-ano Weide, jam antaŭ la nazi-reĝimo poicano, poste eksigita el sia orico por sia poituka konvinko, pli poste dum multaj jaroj sukcesa Ĉeĥ-instruisto en Danlando, kaj nun denove en sia orico kiel poicna inspektoro en Hamburgo, sendis al ni raporton, el kiu ni ĉerpas la jenon:

En la monatoj julio kaj aŭgusto multaj eksterlandaj esperantistoj travojaĝis nian urbon, survoje al la kongreso en Bern aŭ en Aarhus, aŭ por viziti samideanojn en aliaj landoj. Ĉutage la Hamburgaj esperantistoj estis en la stacidomoj por rapide saluti la pasantojn. La aŭtobusvojaĝantoj haltis en la polica lernejo, kien venis samideanoj eĉ el Berlin kaj Kiel por povi dum kelkaj momentoj paroli kun la eksterlandanoj. Multaj malnovaj pioniroj dum 14 jaroj ja ne havis okazon por paroli kun eksterlandaj samideanoj. La ĉefo de la polica lernejo, sektora cefo Albert, salutis germanlingve la francojn kaj la nederlandanojn, kiuj vojaĝis al Aarhus. Revojaĝante la francoj eĉ tranoktis en la polica lernejo; la Hamburganoj nur bedaŭris la neebilon doni pli da komforto. « Por kelkaj tagoj » (skribas s-ro Weide) « niaj « kalorioroj » tre altiĝis; koran dankon, bonkoraj donacintoj! »

**Kontakto**

Ha, bonan ..., Kara! Feliĉe ke mi denove aŭdas vian voĉon! Ĉu vi agrable libertempis?

Ho, jes? Ankaŭ mi, dankon!

Kompreneble! Ĉie dum la someraj tagoj la esperantistoj renkontis unu la alian. Kaj ne nur por amuziĝi; ofte por labori.

Jes, Kara, labori! Jes, jes, EN la libertempo. Multaj eĉ ŝvitege laboris por la verda idealo.

Azenoj, vi diras? Eble vi pravas; sed atentu bone: VERDAJ azenoj. Estas ja diferencoj!

Aŭdu: En Francujo, en la urbo Angers, laboregis dum plej varmegaj tagoj tiaj verdaj inteligentaj bestoj. Ili eĉ starigis novan organizon, sub la persona gvidado de Jan Kelt. La asocio nomiĝas: A.Z.E.N.O., t.e. Asocio Zorganta Esperanton Nepran Optimisman.

Sensencaĵo? Tute ne, Kara! La asocia vivo forte floras; multaj jam fariĝis Azenoj aŭ, se vi volas, tute simple: Azenoj, sed tiukaze VERDAJ Azenoj. Ne malatentu tiun adjektivelon!

Kion la asocio celas atingi? Aŭskultu, Kara, ĝia programo estas mallonga. Ĉiu subskribinto deklaras solene:

1. Mi nepre uzos la lingvon laŭ kiel eble plej vivanta maniero.

2. Mi penos esti modelo de Esperantista Nerompebla Bonhumoro.

3. Mi ĵuras konstante kotizi per fervoro al la lingvo kaj subteno al ĝia literaturo. — Nu, Kara, kion vi diras pri tio? Nenio por vi?

Ne, tion mi bone komprenas. Vi ja estas nur ORDINARA azeno.

Ne koleriĝu, Kara Mia; nur kolorigu, tiam la afero estos en bona ordo.

E. Z. Oboło :

**Tiuj damnitaj Nederlandanoj!**Rememoroj el la tempo  
de la germana okupado.*Kiamaniere oni eksplodigis Gestapo-  
aŭtomobilojn.*

Foje en Amsterdam nin ĝenis germanaj serĉ-aŭtomobiloj por serĉi sekretajn send-aparatojn. Estis kvin da ili en tiu urbo, kaj ili staris kune en garaĝo. Ni aĉetis iom da *trotilo* (eksplodaĵo) kaj iris nokte al unu el tiuj aŭtomobiloj, kiu dumnokte ĉiam restis ekstere por esti tuj preta servi al la Gestapo. Antaŭe ni masonis iom da trotilo en kelkaj blokoj, aliris la aŭtomobilon kaj metis kelkajn blokojn tiel preparitajn inter la aliajn. La aŭtomobiloj tiutempe devis veturi per lignogaso, ĉar mankis benzino, kaj tial devis uzi lignajn blokojn. Ni foriris nevidite kaj bone atentis, kio okazos. Kiam la Gestapo komencis veturi per la aŭtomobilo kaj apenaŭ iris kelkcent metrojn, la tuta veturilo eksplodis kun la ensidantaj gestapanoj. Ili trovis certan morton. Niaj spionoj ĉe la Gestapo informis nin, ke neniam oni povis kompreni, kiel tio povis okazi. Sed ni ja bone komprenis!

Eĉ kvarfoje ni faris la samon; ĉar tamen ĉiufoje la Gestapo lokis alian aŭtomobilon ekstere por havi ĝin tuj je sia dispo. Sed la kvinan kaj lastan aŭtomobilon oni lasis en la garaĝo kaj ne plu kuraĝis veturi per ĝi. Dume ni estis kontentaj, ĉar nun la serĉ-aŭtomobiloj ne plu ĝenis nin en nia malfacila laboro. Tiuj damnitaj nederlandanoj, ĉu ne?

**Maks.***Nesingardemo fariĝas fatala.*

En la tempo de Hans (vidu en n-ro 12) la nederlanda teritorio por la sekreta milita informservo estis dividita en du partoj: okcidenta kaj orienta. Maks estis la ĉefo de la orienta parto. Ankaŭ li estis sperta «subterulo». Foje li estis vundita kaj kaptita, kaj tio okazis jene:

Oni estis petinta lin gardostari ĉe malgranda vilao apud lia loĝloko; tie estis submergiĝintaj kvar judoj. Maks konsentis por fari servon al tiu kiu ordinare tie gardostaris. Ĝuste en tiu tago venis la Gestapo por traserĉi la domon. Ili trovis nenion kaj nenion, krom Maks, kiu feliĉe en tiu tempo ankoraŭ ne estis konata al ili.

«Tamen ĉi tie devas esti judoj!» ili diris. Denove oni serĉis kaj ree nenion trovis. Ili ekaŭskultis sub morta silentado, ĉar la vilao staris en la kamparo inter arbaretoj.

Subite ili aŭdis brueton apenaŭ percepteblan: iu el la judoj estis funkciiginta malgrandan aŭtomatan baterion (poŝtlampoj kun manipulo kiun, por akiri lumon, oni rapide kaj sinsekve devis pinĉi per la dikfingro). «Jen ili estas!» kriis la Gestapanoj kaj iris en la direkto, el kiu venis la

**Parolas la leganto (Libera Tribuno).**

LA DUBA MONDPACO.

Antaŭ nelonge mi legis en Heroldo artikolon, en kiu la socikreditan J. W. L. el Londono skribis, ke nek la germana popolo nek Hitler eldevegis la duan mondmiliton, sed ke la dua mondmilito estis eldevegita de la mondkapitala sistemo.

Tiu opinio estas ĝusta. Ni ĉiuj nacioj, kiuj estis okupitaj de germana militistaro kaj spertis la turmentojn, maltrankvile atendis mondpacon. Tiam ni ĉiuj imagis ke post la milito ni vivos en plej granda interkompreno, ke ni ĉiuj estos liberaj, ke ne plu estos ekonomia limo, sed nur limo nacia, ke ni ĉiuj ekonomie estos kvazaŭ en granda unuigo. Plue ni imagis, ke la industrio de Eŭropo estos juste distribuata laŭ la bezono de ĉiu ŝtato, ke neniu plu estos elprofitata, kiel okazis en pasinta tempo. Ke al ĉiu estos eble iri aŭ vojaĝi tien kien li volos, ke la mondsistemo en Eŭropo estos unueca ktp. Sed ni ĉiuj estas seniluziigitaj.

Ja tiam kia estis la interkompreno inter la politikistoj kaj registaroj! Kiel rapide ili sciis interkonsenti pri ĉiuj problemoj! (Almenaŭ ĉiam tiel raportis la Londona kaj Novjorka radioj, kaj ni ĉiuj aŭskultis kun granda ĝojo, atendante la mondpacon.)

Nun forpasis jam pli ol du jaroj post la milito, sed la vera paco ne kaj ne povas naskiĝi. Kial ne? Ja se estis interkompreno dum la milito, kial ne ankaŭ nun? Ĉar tiam estis unu celo: malvenki la Hitlerismon kaj faŝismon.

Antaŭ la dua mondmilito la demokratiaj ŝtatoj devis sin armi nur tial, ke ili havu ekvilibron kontraŭ la germanoj kaj japanoj, ĉar tiuj estis danĝeraj militaristaj ŝtatoj. Sed nun, jam postlasinte la duan mondmiliton, kial la demokratiaj ŝtatoj armadas siajn armeojn je pli granda skalo ol antaŭe, nun kiam oni jam ne povas diri, ke la germanoj kaj japanoj estas danĝeraj, almenaŭ momente ne?

Sed ni ne forgesu, ke ankoraŭ restis du societoj, nome la demokratio kaj komunismo, kiuj unu kontraŭ la alia estas precize tiel malamikaj, kiel ili ambaŭ estis kontraŭ la faŝismo. Tio estas la kaŭzo, pro kiu ne povas naskiĝi la mondpaco.

brueto, sed nur malfacile ili trovis la enirejon al la kaŝejo.

«Tiaj stultuloj!» diris Maks en si mem, rilate al la judoj. Kial ili ne atendis lian duan signon kiu ilin sciigus ke la danĝero pasis? Ĉar per elektra butoneto, bone kaŝita, li povus informi ilin.

Bedaŭrinde, por la malfeliĉaj judoj ne plu ekzistis savo, sed jes ankoraŭ por Maks. Li uzis tiun momenton por bategi per seĝo la kapon de la ŝoforo, preni sian biciklon kaj forveturi. Oni pafis post lin, kaj kuglo trafis lin en la malsupran parton de unu kruro; sed li jam estis je kelka distanco de l' Gestapanoj. Li falis, kaj lia unua penso estis ke lia paperujo ne devas veni en iliajn manojn. Li rampis al longfoso kaj kaŝis tie la paperujon. Poste li rampis reterne kaj lasis sin aresti, ĉar la vundita kruro multe doloris.

Li povis preni lokon en la aŭtomobilo kaj estis transportata al apuda urbo. Tie la Gestapanoj ordonis al taksiveturisto konduki lin al iu malsanulejo. Ili notis la nomon kaj adreson de la veturigisto, la numeron de la taksio, kaj poste foriris kun la judoj. (Daŭrigota.)

Pro la citita cirkonstanco, mi povas konstati, ke por malgrandaj nacioj nuntempe estas nenio estonteco, ĉar la nomitaj du societoj devigas la malgrandajn naciojn akcepti iliajn principojn.

Estas vero ke la abismo estas profunda; sed se ni malgrandaj ŝtatoj povis ripari kaj rekonstrui detruitajn pontojn almenaŭ provizore, ni konstruu nun novan ponton trans la profundajon, kiu estas inter la oriento kaj okcidento, per Esperanta interkompreno, kaj unuigu en granda familio. Mi opinias ke tiu tasko apartenas la unuan fojon al ĉiuj fakseciaj societoj de la tutmonda laboristaro, kiuj estas pli fortaj ol ĉiuj politikaj societoj.

Finante miajn liniojn, mi ekscias ke similan ponton oni jam komencas konstrui inter Belĝujo, Nederlando kaj Luksemburgo. Se tio estas vero, ni ĉiuj tutkore gratulase.

**NOVA OFENSIVO POR ESPERANTO.**

Prava estas s-ano C.M.C. el Alexandria, kiam li diras en n-ro 14, ke prefere la elektota lando, en kiu oni komencu fortan, celkonscian propagandon por Esperanto, estu centra. Multe pli evidenta estas la utilo de Esperanto en landoj, kiuj situas meze en la lingva kaoso, ekzemple en Mez-Eŭropo, ol en izolaj landoj kiel Islando.

Se la Esperanto-movado disponus pri sufiĉe multaj propagandistoj kaj sufiĉe da mono por komenci fortan propagandon en lando(j) kun milionoj da loĝantoj, la nova ofensivo verŝajne komenciĝu en lando kiel Aŭstrujo, Hungarujo aŭ Ĉeĥoslovakujo. Sed bedaŭrinde ŝajnas, ke estas ioma manko en tiu rilato. Se ni kalkulas, ke por la nova ofensivo la movado bezonas kvar propagandistojn en Islando, laŭ la nombro de loĝantoj ĝi bezonas 240 en Aŭstrujo, 310 en Hungarujo kaj 517 en Ĉeĥoslovakujo. Se ni jam estas sufiĉe fortaj por vere efika agado en iu el la menciitaj landoj, ni nepre en tiu ĉi aŭtuno komencu tie agadon, kiu efektive meritas la nomon *nova ofensivo por Esperanto*. Se ne, ni prefere komencu en Islando ol nenie!

O.S.M.

**PRI LA FORJETADO DE SPERTO.**

De Richard L. Evans.

Ekzistas pika frazo de Benjamin Franklin: «Sperto estas multekosta lernejo, sed malsaĝulo povas lerni en neniu alia.» Tiuj ĉi vortoj sugestivas de manierojn, per kiuj ni lernas la lecionojn de vivado: per nia propra sperto kaj per la sperto de aliaj. Ili sugestias ankaŭ ke la sperto de aliaj estas granda heredaĵo kaj ke, ju pli ni lernas da ĝi, des pli da vivo ni forkonsumas. Ekzemple, se ĉiu sciencisto insistus reiri al la komenco por tufari ĉiujn eksperimentojn, kiujn ĉiuj liaj antaŭuloj tufaris, estus malmulta aŭ neniu progreso en la scienco. Se ĉiu esploristo forjetus ĉiujn mapojn kaj ignorus ĉiujn antaŭajn esplorojn, estus malmulta aŭ neniu eltrovado. La vivo estus forkonsumata trovante tion kio estas jam trovita.

La antaŭularo lasis al ni kompare malmulte da palpeblaj, sed ili lasis al ni multe da profitdonaĵoj: la grandan trezoron de sia sperto, la grandan heredaĵon de rivelita kaj eltrovita vero. Jesuo de Nazareto, ekzemple, postlasis al ni neniujn palpeblajn. La historio ne registras ke li posedis iujn. Sed li postlasis al ni vivmanieron, kiu enhavas la solvojn de la homaj problemoj kiuj persekutas tiun ĉi kaj ĉiun alian generacion. Sed parolante idiome, ni ŝajne insistas komencadi de la «komencino». Kaj ofte per kontuza pugnobatemo ni batas la vojon tra la vivo, malŝpareme pruvante tion kion multaj homoj antaŭe miriadfoje malsaĝe pruvis, mallerte manuzis kaj ŝanceligis. Se ni efektive ne forjetas la mapojn, almenaŭ ni ŝajne decidis ofte ignori ilin. Ni rigardas kun konfuza kompato la malŝpareman filon kiu diboĉe forkonsumis hereditan posedaĵon. Sed la intenco forjetado de sperto el fidindaj originoj estas el la sama materialo kaj koloro kiel la intenco forjetado de palpeblaj. Kaj se infanoj ĉiam ignorus ĉion, kion la gepatroj lernis — ĉion kion ĉiuj homoj pruvis pri la vivo —, tio signifus la nebezonatan multobligadon de multaj eraroj.

(Kopirajtigita 1946, parolado farita en la Mormona Tabernaklo de Richard L. Evans kaj tradukita kun afabla permeso de l' parolinto de Charles H. Briggs.)

**Kiuj ni estas?**

Por la multaj filatelistoj inter niaj samideanoj, ni tiun ĉi fojon prezentas filatelan enigmon. La demando estas, doni la nomojn de la ĉi-supre prezentitaj personoj, kun la nomo de la lando, kie la koncerna poŝtmarko eldoniĝis. Ekz.:

1. Reĝino Wilhelmina, Nederlando.
2. ....
3. .... ktp.

La sinsekvo estas tute libera, vi nur indiku 20 nomojn. Ĉiu rajtas partopreni, ĉiu rajtas ensendi plurajn solvojn; sed ... validas nur filatele afrankitaj respondoj (bonfaraj, memorigaj aŭ aeraj poŝtmarkoj). Sur la koverton skribu: «Enigmo».

Jen la premioj (ĉiuj estas nederlandaj eldonoj):

Cefa premio: La kompleta serio por la Turismo (1932);  
Ekstra premio por la plej bele prizorgita solvo: Aerpoŝtletero (speciala KLM-koverto pri la unua oficiala aerveturo Amster-

— Tiam, pro indigno, verŝajne eksplodos novaj kontraŭagoj.

— Eble la esplorkomisiono de UNO enmiksiĝos en la aferojn? ...

— Kamaradoj, ekaŭdiĝis firma voĉo, ja ni veturos partopreni la Esperanto-kongreson! Lasu do ĉiujn nigrajn pensojn pri luktoj, bataloj kaj militoj! Ni iras al kongreso pacama ...

— Kaj interkonsenta, interrompis alia voĉo, — al kongreso, kies tasko estas denove kunfandi la du agocentrojn de nia movado.

— Estas plezuro forlasi la randon de nia ĉiam flamerupcianta kontinento kaj iom ripozigi de niaj problemoj.

— Recipe, ĉar ni iras en landon, kie kvar gentoj interkonsente kreis modelan kadron de komuna ŝtateco, toleremo kaj kunlaborado.

— For de ĉi tiuj troardaj aziaj bordoj! Iru ni al la bela Svislando, ĝui ĝiajn naturmiraklojn, kulturajn vidindaĵojn kaj pacamon. Helpu ni al kunfluigo de IEL kaj UEA. Forgesu ni dume la proprajn dolorojn kaj suferojn!

— Vivu la 32-a Universala en Bern! ...

Baldaŭ ekaŭdiĝis tintgrincado de rustiĝintaj ĉenoj, kaj la ŝipanko komenciĝis malrapide leviĝi.

Adiaŭ, patrujo! *Salom!* Pacon al ĉi!

(Daŭrigota.)

**Tra tri kontinentoj**

Nia samideano J. Kohen-Cedek en Jerusalema sendis al ni serion da interesaj artikoloj, sub la supra titolo, kaj kun subtitolo: «Vojaĝimpresaj plumŝprucoj survoje al la 32-a Universala». Ne jam povante decidi, ĉu ni trovos lokon por la tuta artikolaro, ni publikigas hodiaŭ la unuan artikolon el la serio. — Red.

**Azio.**

— Ŝajnas, ke en Koreo kaj en Manĉuko estas nun sufiĉe trankvile?

— Sed ne en Indonĉinio.

— Kaj ne en Indonezio.

— En Hindujo la reciproka ekstermado prosperas.

— La Falĉisto havas tie abundan rikolton.

— Kiel statas nun la Siria-Transjordanja miskompreno?

— Espereble, la konflikto restos nure diplomata.

— Kio nova estas rilate al la kurda problemoj?

— Kiulanda? Iraka, turka aŭ persa?

— La triobla ...

— La demandito pro nescio levas la ŝultrojn.

— Car, verdure, neniu scias kio kaj kie povas surprize eksplodi. Sed ĉiuj ni scias, ke la tuta Azio estas granda pulvbarelo. Sufiĉas nur unu faj-

rero, por ke ĝi ekflamiĝu de Siberio ĝis Adeno.

— Kion do efikas la Panazia Kongreso en Delhi?

— Ĝi ŝajniĝis gajan mienon dum malsukcesa ludo.

Jes. Tia estas Azio, mia arda kontinento: ĉiam bolanta, bruanta, luktema; ĉiam nervema, streĉita, plena de pasioj, netolerema, fajrosanga kaj suntemperamenta. Ĝiaj problemoj estas komplikaj, ekstremakraj, solvurĝaj, sed apenaŭ kompreneblaj.

Ekzemple, mia malfeliĉa patrujo — Palestino.

Ja ĝi estas modelo de reciproka miskompreno, malkontento kaj nekvietigebla ribelemo. Eĉ la antikva Roma Anglo ne povis superregi ĝin, ĝis la tuta lando estis ruinigita kaj ĝia loĝintaro forĝidita en kaptitecon. Ĉu la samon intencas fari nun la Brita Leono?

Tiamaniere meditis ni, dudek-kvar samideanoj, ĉe marrando en la Ĥafja haveno. Ni dubis: ĉu bonan kaj konvenan tempon elektis por ni la hazardo, ke ni ĝuste nun forlasu la patrujon kaj forvojaĝu Bernon, por partopreni la 32-an Universalan Esperanto-Kongreson?

— Ne bone ni faras, forlasante la landondum tiamalkonvena tempo! plendis unu el ni.

— Laŭ onidiro, baldaŭ estos pendigataj la tri kaptitaj ribeluloj.

dam-Newyork, kun speciala stampo);

3-a premio: La sama, sed pri provveturo Amsterdam-Johannesburg;

4-a premio: Unua-tago koverto kun kompleta serio da infanmarkoj (princindoj);

5-a premio: La sama.

Solvoj atingu nin antaŭ la 31-a de januaro 1948. Bonan sukceson! Adresu ĉion al: P. Moen, ĉefdelegito de UEA, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, Nederlando.

**EKZAMENU VIN MEM!**

Respondoj

al la demandoj en la pasinta numero.

86. Brazilo 1937.

87. a) Kalman (Kolomano), b) Robert, c) Paul, d) Pierre, e) Edmond, f) Raymond, g) Eduard, h) Harold, i) John Mabon.

88. a) Du kokerikantaj kokoj; b) Kokplumojn.

89. 1. Montekarlo; 2. Ameriko; 3. Japanujo; 4. Santiago; 5. Tahitio; 6. Riviero; 7. Orinoko. — Majstro.

90. 1910 Washington; 1915 San Francisco.

**Novaj demandoj kaj taskoj.**

91. Kiu Universalaj Kongresoj okazis en Antverpeno, kaj kiam?

92. Kiu estis kapitano Bayol?

93. Ordu la ĉi-malsuprajn literkombinojn tiel, ke ili, sinsekve, nomas proverbon: edzo, lool, nopl, ersa, edzi, sper, ielv, enve, telo, fune, persi, rŝas.

94. Serĉdemandoj: Kio ĝi estas?

a) Ne havas krurojn, rondvojaĝas kaj perfekte parolas Esperanton;

b) Ne havas krurojn, vojaĝas mil mejlojn en unu sekundo kaj perfekte parolas Esperanton;

c) Havas du krurojn, portas la verdan stelon, perfekte parolas Esperanton, kaj ne estas esperantisto.

95. El kiu romano estas la jena teksto: S-ino Heath preskaŭ lasis fali la pleton, kiun ŝi portis. — «Mi ja ĉiam kredis, malantaŭe en la kapo, ke vi estas elegantulo!» ŝi ekkriis. «Vera frako kaj tiel plu, kaj vi aspektas, kvazaŭ vi naskiĝis en ili.»

**RIDO SANIGAS.**

REFERENCOJ.

Bienulo en iu vilaĝo estis konata kiel malfabla homo kaj kiel tirano por siaj dungitoj. Iutage al tiu bienulo venis kamlaboristo el fremda regiono kaj petis esti dungata. La bienulo demandis lin, ĉu li posedas referencojn. La laboristo ne posedis skribajn referencojn kaj foriris por havigi al si tiajn. Sed jam post nelonge li revenis. «Nu,» demandis la bienulo, «ĉu vi ricevis viajn referencojn?»

«Ne,» konfesis la laboristo; «sed mi ricevis tiajn pri vi, kaj mi volas nur diri al vi, ke mi ne povas akcepti la postenon.» (D.G.)

**Esperanta Radio-Kalendaro.**

La horindikoj estas laŭ norma GMT (Tempo de la Meridiano de Greenwich). En landoj kun normala mezeŭropa tempo (ekz. Nederlando) oni aldonu unu horon.

Ni ne povas garantii pri la korekteco de la hor-indikoj; eventuale ni petas ĝustigon.

**Ĉiutage:**  
16.30-16.45 Praha 1935 kaj 25,34 m.  
22.00-22.15 Praha 31,41 m.

**Dimanĉe:**  
5.00, 7.00, 9.00, 11.00 Radio-Esperanto (nigra stacio) 2,5 kaj 5 m.

**Lunde:**  
21.50-22.00 Praha 470 m.  
23.30-23.35 Budapeŝt 549,5 m. Sciigoj.

**Mardo:**  
17.20-18.30 Wien 31,41 kaj 228,6 m. Informoj en Esperanto.

17.45-17.50 Schwarzenburg (Bern) 31,46 kaj 48,66 m. Pri Svislando. (D-ro Baur.)

18.50-19.00 Sofia 32,9 m.  
20.45-21.00 Hr. Kralové 238 m. (Ne elsendas la unuan mardon en la monato.)

21.50-22.00 Ostrava 259 m.  
**Merkredo:**  
10.15-10.35 Paris 431,5 m.  
20.10-20.25 Warszawa 49,06 m.  
23.30-23.35 Budapeŝt 549,5 m. Sciigoj.

**Ĵaŭde:**  
5.33-5.45 Wien 506,8 m. Germanlingve pri Esperanto.

17.45-17.50 Schwarzenburg (Bern) 31,46 kaj 48,66 m. Pri federalismo kaj paco. (Prof. D-ro Privat.)

21.50-22.00 Praha 470 m.  
21.50-22.00 Ostrava 259 m.

**Vendredo:**  
17.45-18.00 Hilversum II, 415 m. La Evangelio per Esperanto. (S-ro de Boer.) Nur la 21.11.

18.50-19.00 Sofia 32,9 m.  
23.30-23.35 Budapeŝt 549,5 m. Sciigoj.

**Sabate:**  
ĉ. 15.00 Hilversum VARA, 301 m, nur je 1.11. (prelego de A. F. v. Haren pri «FLE-Amikaro») kaj 6.12. («Verda Kabareto»).

**Esperanta meso el Radio Praha.**

La 27.8., Radio Praha elsendis per mallongaj ondoj Esperantan sanktan meson, celebratan de Prof. A. Beckers en Mechelen-Maas, Belgio, okaze de la 950-a datreveno de la martira morto de Ĥ unua ĉeĥa episkopo, S-ta Vojtech (Adalberto).

Oni atentu la parte novajn ondojn kaj elsendhorojn de la ĉeĥoslovakaj stacioj. Menciinde estas, ke la ondo 25,34 m estis pasintjare aŭskultita en Afriko kaj Ameriko. Do, samideanoj en tiuj kontinentoj bonvolu speciale aŭskulti kaj poste raportii pri la ricevo.

**La publiko mem deziras Esperanton.**

La 21.9. okazis interesa intervjuo pri Esperanto antaŭ la mikrofono de AVRO (nederlanda ĝenerala radio-asocio), kun la sekretario de «La Estonto Estas Nia», s-ro Mr. Kalma, kiel intervjuito. Ĝis nun tiu asocio estis tre rezervigema al nia afero. Antaŭ nelonge ĝi proponis al la aŭ-

**Ni recenzas.**

**Ĝuinda libro, bonege tradukita.**

*Theo Thijssen: La nevenkebla ĝeno.* Momentoj de tualeta mizero. El nederlanda lingvo tradukis F. Faulhaber. — 319 p., 14 x 19 cm. Prezo bind. glđ. 4.90 Eldonis Libroservo FLE, Amsterdam. Havebla ĉe la Libroservo de Heroldo.

Estis bona ideo de la Libroservo FLE, alternigi la serion de siaj beletraj eldonoj per volumo de «malpeza» legaĵo. «La nevenkebla ĝeno» estas rakonto, kiu kvazaŭ per unu okulo ploretas kaj per la alia ridas. Ne streĉa romano, sed kolekto da skizoj pri tualetaj zorgoj kiuj povas okazi al homo (viro) en diversaj aĝoj kaj cirkonstancoj de la vivo. Libro verkita kun bona kompreno de la psikologio, de homaj vanteco kaj malfortoj. Libro, kiu distras kaj amuzas, kaj kiu surprizas per pli ol unu «bona poento». Tiam libron oni ne forglutas en unu vespero; sed ĉiutage frandante unu aŭ kelkajn ĉapitrojn, oni prethavas ĝuindan menuon dum du aŭ tri tutaj semajnoj.

La traduko de F. Faulhaber estas bonega, kielkloke eĉ tro korekta, ekz.: «Kiel tiu homo trafis (anst. trafis) ĉi tien?» Certe, kiu volas trovi ion por kritiki, povas ĝin trovi ankaŭ en ĉi tiu libro. Mi nur nomas nekutiman akuzativon post tra («tra tian veteron») sed nominativon post trans («klinas sin trans la tablo»). Ankaŭ en ĉi tiu libro oni konstata la preferon de l' FLE-rondo por adjektiva finaĵo anstataŭ adverba: Ili staris tie nur babilantaj; Onjo Kee tenas ĉapeleton kia terura sonĝo; aspektas kia iu, kiu maĉas (tre malagrabra hiato de kvar sinsekvaj vokaloj!). Al tia uzado mi ne povas kutimiĝi. Sed cetere la libro kaj la traduko meritas ĉian laŭdon.

T.J.

kultantoj dek temojn por preparolado antaŭ la mikrofono, unu el kiuj estis Esperanto. Nu, la publiko donis al Esperanto la plej multajn voĉojn, kaj la intervjuo estis la rezulto de tiu voĉdonado. Dua intervjuo sekvos baldaŭ.

**Pro la pozitiva eĥo ...**

Gesamideanoj, la diverslandajn radio-elsendojn en aŭ pri Esperanto ne nur aŭskultu, sed nepre skribu pri via aŭskultado al la koncernaj stacioj! Sen viaj leteroj aŭ poŝtkartoj la radio-stacioj ne scias, ĉu la Esperanto-elsendoj estas aŭskultataj, kaj ĉu ili trovas aprobon. Sed se la stacioj ricevas multaj leterojn, ili volonte daŭrigas kaj eĉ pliampleksigas la Esperanto-elsendojn.

«Pro la pozitiva eĥo,» oni skribis al ni, «kiun trovis la Esperantaj ĉiutagaj elsendoj dum la Universala Kongreso en Bern, la direkto de la Svisa Mallonga Radiostacio Schwarzenburg decidis enkonduki duan esperantlingvan radio-elsendon, kiu okazos de post la 7-a de oktobro ĉiumarde.» (Vidu la horojn en nia Kalendaro!)

Bonvolu aŭskulti kaj poste skribi al: Schweizer Kurzwellendienst, Neuengasse 30, Bern.

**ANONCETOJ**

*Naskiĝo Kooij.* La 17.9. naskiĝis al gesanoj H. Kooij v. d. Waal, Pletterijstraat 51, Den Haag, Nederlando, filo nomita Dirk Johannes. — Koran gratulon!

*Edziĝo Korff-Hoenders.* La 1.10. geedziĝis gesamideanoj A. M. D. Korff en Amsterdam kaj M. R. Hoenders el Den Haag, Nederlando. — Nian koran gratulon!

*Danko.* S-ano Jozefo Scalenghe, Via Accademia Albertina 42, Torino, Italio, dankas plej kore al la usonaj kaj kanadaj gesamideanoj, kiuj sendis al li helppaketojn, kaj al ĉiuj, kiuj alimaniere montris al li sian helpon kaj amikecon. Vivu nia kara lingvo Esperanto!

*Letervespero* okazos en decembro. Certe respondos, Odense Esperanto-Klubo, Ostervaenget 1, Odense, Danlando.

*Egiptujo.* Nian anoncon pri korespondado en Heroldo lastjare reprenis multaj aliaj gazetoj, sen nia scio, tial ni ricevis kaj ankoraŭ ricevas centojn da leteroj el la tuta mondo. Bedaŭrinde ni ne havas tiom da korespondemuloj; tial ne estas al ni eble respondi al ĉiuj. T. Megalli, P.B. 450, Kairo.

*Kio estas Pensologio?* Broŝureto sendota senpage, kun folio *La Vivo Transformita*, laŭpete al (H) Hipsley, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Angloloando. — *Povo sukcesi* kontraŭ 3 int. resp.-kuponoj. «Traktajo-rekomendinda kaj priprensinda, kun instruo tre bezonata en la nuna tempo!» (British Esperantist). Hipsley, kiel supre. (42)

*Kiu sendos al mi 100-200 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos saman kvanton de Meksiklando.* M. G. Rodriguez, Apartado No. 2482, Mexiko D. F. Respondo garantiata. (43)

*Hungara esperantista fraŭlo,* 42-jara, ŝtatoficisto, deziras korespondi kun esperantistaj fraŭlinoj kaj vidvinoj en la tuta mondo. Se estus ebla edziĝo, mi irus ankaŭ eksterlanden. Leterojn kun fotografajo kaj naciakolora rubando sendu al: Rezső Répas, Tatra tér 1, Szeged, Hungarujo.

*Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.* Skribu al: Jorgé Antonio Medeiros, Nova Lisboa, Angola, Afriko Okcidenta Portugala. Certe respondos.

*S-ro A. W. Withoos,* Venkelstraat 15, Eindhoven, Nederlando, interŝanĝas Esperanto-gazetojn. Preferas: Esperanto, Esperanto Internacia, Esperanto Triumfonta, Amerika Esperantisto, Espero Katolika. Sendu mankoliston!

*Reveninte el militkaptiteco* kore salutas ĉiujn gekonatojn Franz Hub (iam Gablonz, Csl.), nun Bergwellerweg 10, Wittlich, Rheinland, franca zono, Germanujo.

*Mazzon Ettore,* Via Udine 35, Trieste, interŝanĝas poŝtmarkojn (30-50), pecon kontraŭ peco, el la memor-, bonfaraj kaj aer-serioj.

*S-ro Slavĉo Hristov,* str. Batenberg 23, Kjustendil, Bulgario, deziras korespondi kun gesamideanoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

*Korespondadon kun gesamideanoj ĉiulandaj* serĉas Max Hesse, Stremesmannplatz 10, III, (19a) Halle/Saale, rusa zono, Germanujo.

**La novaj kotizoj de Heroldo**

*La nova abonperiodo daŭros 15 monatojn:* de oktobro 1947 ĝis jarkon 1948. Tio estas por plenumi la peton de multaj legantoj, ke ni denove koincidigu la abonperiodon kun la kalendaro jaro.

*La novaj abonkotizoj restos proporcie la samaj* kiel la ĝisnunaj. T. e. ĉar la abonperiodo daŭros je du trionoj pli longe ol la ĝisnuna, ankaŭ la kotizoj estos je du trionoj pli altaj; sed oni povos pagi en du partoj — la unuan parton tuj, la reston ĝis la 15-a de majo 1948. La unua partopago estas por la pli multaj landoj la sama kiel la ĝisnuna kotizo por 9 monatoj, kaj la restpago proporcie estas la sama por 6 monatoj; sed ĉar BEA jam akceptis kotizojn laŭ la pli alta nova kotizo de UEA, sekve por britoj la dua partopago estos konforme pli malalta. Pro la malalta kurzo de la itala liro ni bedaŭrinde ne povis konservi la ĝisnunajn kotizojn por Italujo, tamen eĉ la nunaj restas ĉ. 30 % sub la kotizoj por la aliaj landoj.

Sur la titolo ni presis la 15-monatan kotizon kiel kotizon por *jarabono* kaj indikis, ke la numeroj de okt.-decembro 1947 estas donotaj *premie*; tion ni faris por eviti, ke novaj abonontoj atendu kun sia mendo ĝis la jarkon.

Grandan embarason kaŭzis al ni la fakto ke, eĉ nun, *malpli ol duono de la abonantoj* skribis al ni pri sia intenco daŭrigi

la abonon. Sed kiel ni disponu, se ni ne scias, pri kiom da restontaj kaj eksigontaj abonantoj ni devos kalkuli? Pensu pri la malfacilaĵoj koncerne paperon ktp. Malagraba konsekvenco de tio estas, ke ni devos prokrasti la *duonmonatan* aperigadon ĝis post la 15-a de novembro. Tio signifas, ke la *venonta numero* povos aperi nur la 15-an de novembro, kaj ke nur ekde tiu dato Heroldo povos repreni sian *duonmonatan aperadon*.

Por *Aŭstralio, Egiptujo, Irlando kaj Novzelando* validas la samaj kotizoj kiel por Britujo. Oni pagu respektive al: L. E. Pfah, 64 Brighton Street, Croydon, N. S. W.; Tador Megalli, P. O. B. 450, Cairo; L. O'huiginn, Bothar Glasard 16, Tor Fhionnabhair, Dublin; Brendon Clark, R. D. Makarau, via Kaukapakapa, Northland. — *Bulgario* informiĝu pri abonkotizoj kaj prezo de anoncetoj ĉe: Bulgara Esperanto-Asocio, Str. Graf Ignatiev 2-II, Sofia.

Internaciajn poŝtajn *respond-kuponojn* ni akceptas kiel egalvaloron de 0.20 ned. guldeno. *Anoncetoj* pagataj per respond-kuponoj kostas po 6 resp.-kuponoj por ĉiuj komencitaj 25 vortoj aŭ mallongigoj.

Ne pagu al nia administracio malgrandajn sumojn per ĉeko; ne sendu al ni eksterlandajn monbiletojn en letero!

Lando	Valuto	Abonkotizo (15 monatoj)	Unua partopago (tuj pagota)	Dua partopago (pagota ĝis 15.5.1948)	Kotizo de Subtenanto	Anoncetoj (po 25 vortoj)	Oni pagu la kotizon al
Argentino	pesoj	14.—	10.—	4.—	28.—	2.—	E. Iglesias Nunez, Dehesa 1860, Buenos Aires
Aŭstrio	aŭ. ŝil	35.—	25.—	10.—	70.—	5.—	«Tramondo», Neutorgasse 9, Wien I
Belgujo	b. fk.	165.—	100.—	65.—	330.—	25.—	Flandra Esp.-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brusel-W. (pĉk. 3268.51) aŭ: Belga Esp.-Inst., Antw.
Brazilo	kruz.	65.—	40.—	25.—	130.—	10.—	Brazila Ligo Esp., Pr. de Republica 54, Rio de Janeiro
Britujo	ŝil.	17/6	12/6	5/-	1-15/-	2/6	Brita Esperantista Asocio, London W. 11
Ĉeĥoslovakio	ĉs. kr.	165.—	100.—	65.—	330.—	25.—	Esp.-Asocio en Ĉsl. Respubliko, Praha 47
Danujo	d. kr.	16.50	10.—	6.50	33.—	2.50	L. Jakobsen, C. Etlarsvej 14, Aabyhøj (pĉk. 541.33)
Finnlando	f. mk.	450.—	275.—	175.—	900.—	60.—	Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-Kä.
Francujo	fr. fk.	400.—	240.—	160.—	800.—	60.—	J. Guillaume (U.E.F.), 34 rue de Chabrol, Paris 10
Germanujo	g. mk.	40.—	25.—	15.—	80.—	6.—	L.&H. Jung, Hauptstr. 9, Horrem Bez. Köln, brita zono
Hispanujo	pes.	35.—	22.—	13.—	70.—	5.—	F. Rivelles Giménez, Ballen 2, 2, Valencia
Hungarujo	for.	40.—	24.—	16.—	80.—	6.—	P. Balkanyi, Kreditbank, Budapest 507
Islando	isl. kr.	21.—	15.—	6.—	42.—	3.—	Esp. Societo Aŭrore, Poŝtkesto 1081, Reykjavik
Italujo	liroj	800.—	500.—	300.—	1600.—	125.—	L. Minnaia, Viale Giulio Cesare 223, Roma
Jugoslavio	dinaroj	165.—	100.—	65.—	330.—	25.—	Ernest Kasović, Gradska ŝtedionica, Zagreb
Nederlando	guld.	9.—	5.50	3.50	18.—	1.25	Teo Jung, Scheveningen (poŝtmandate)
Norvegujo	n. kr.	17.50	10.—	7.50	35.—	2.50	Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo
Portugalujo	esk.	85.—	50.—	35.—	170.—	12.50	J. de Saldanha Carreira, Av. Grao Vasco 33 r/c., Benfica-Lisboa
Svedujo	sv. kr.	14.50	9.—	5.50	29.—	2.—	Förlagsföreningen Esperanto, Boks 19071, Stockholm 19
Svislando	sv. fk.	16.50	10.—	6.50	33.—	2.50	O. Walder, Eigenheim, Romanshorn (pĉk. VIII 12139)
Urugvajo	pesoj	6.50	4.—	2.50	13.—	1.—	D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida)
Usono	dolaroj	4.—	2.50	1.50	8.—	0.50	D.E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37.

*Novaj nomoj!* Originalaj kaj universalaĵaj por ĉio kaj ĉiu. «En Esperantujo ĉiam brilas la suno.» — Provu trikotnovajon (kostumon por banado kaj sunumado) «Radio OJO». — Informoj pri ambaŭ riceveblaj de V. Eronen, *Kerkkoo*, Finnlando.

*Juna fraŭlino, sperta kudristino,* trovas daŭran okupon ĉe sveda firmo. Kondiĉo: Paroli Esperanton. Informon donos Fr. Pytloun, *Hradec Kralové II*, 1010, Ĉeĥoslovakio, aŭ K. Jönsson, Fack 62, *Istad*, Svedujo.

*F-ino Anna Kervella,* Route de Quimper, *Brest-St.-Marc* (Finistère), Francujo, *deziras pagi plurajn jarojn en Anglujo.* Ŝi proponas ian laboron kontraŭ gastado. Bonvolu fari al ŝi oferton.

*Fabeloj de Andersen.* Mi serĉas «Fabeloj de Andersen» kaj literaturon pri Hans Christian Andersen en ĉiuj naciaj lingvoj kaj en ĉiuj malsamaj eldonoj. Interŝanĝi mi sendas Esperanto-librojn. I. Vesterland-Andersen, Bernstorffsvej 78, *Hellerup*, Kopenhago, Danlando.

*37-jara dana instruistino* deziras korespondi kun eksterlandano. Herdis Skyum, *Flade pr. Nykøbing Mors*, Danlando.

*Karl Karger,* EKO-Centro (Esperantista Kooperativo), celas starigon de Esperantista Pensiiono. Iam IEL-delegito en Zwietau, loĝas nun: (16) *Driedorf/Dillkreis*, Germanio. Samcelanoj kunlaborantaj skribu pri detaloj kaj aldonu respondkuponon aŭ poŝtmarkon. (Filatelista sekcio estas starigota.)

*Pri Paneŭropo kaj speciale pri Mondfederacio* deziras korespondi kun diverslandaj esperantistoj f-ino Elise Jacobs, Mathildenstr. 9, (24 b) *Flensburg*, Schleswig-Holstein, Germanujo.

*Korespondadon* pri ĉiuj temoj deziras Franz Bruchert, Ebertstr. 20 S. 1 r., (1) *Berlin O 3*, Germanujo.

*S-ano Heinrich Frese* (vidu en Heroldo n-ro 13) ĝoje dankas al ĉiuj gesamideanoj kiuj skribis al li propagandecle.

*Paul Bröther,* (20) *Hockeln 42*, Post Gross-Düngen, brita zono, Germanlando, forpelita kun edzino el Bad Warmbrunn (Silezio) kaj perdinta sian tutan havaĵon, deziras korespondadon tutmondan, Esp.-libreton aŭ -gazeton, nutraĵojn kaj, se eble, pantalonon kaj jaketon (korpgrandeco 1.88 m).

*Virina sekcio de la Socialdemokrata Partio* en hungara urbo Pécs komencis kurson en la partia domo por 30 virinoj, inter ili la urbestriino. Skribu gratulante al la kurso, proponante korespondadon. Adreso: K-dino J. Tolnay, urbestriino, Székely Bertalan u. 9, Pécs, Hungarujo.

*S-ro August Pensa,* Von Richthofenstr. 12, (13 b) *Augsburg*, Germanujo, estona samideano el Viljandi, petas korespondon kaj interŝanĝon de poŝtmarkoj, precipe kun samideanoj, kun kiuj li korespondis antaŭ la milito.

*Propagandu Esperanton kun profito!* Ricevinte 3 int. respondkuponojn kaj adresitan koverton, ni sendos pluajn informojn Esperanto-Grupo *Ansbach (Mittelfranken)*, Friedrichstr. 15, Germanujo.

*Pli ol 100 gesamideanoj* deziras korespondadi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Skribu tuj al s-ano F. W. Poppeck, (17 b) *Oedbach/Baden*, Kreis Offenburg, Germanujo.

*Esperantistoj! Aĉetu viajn plantojn,* florbulbojn kaj arbustojn ĉe s-ano H. de Water, Vijzelstraat 203, *Scheveningen*, Nederlando. Petu ilustritan prospekton! (38)

*Deziras aĉeti ekzempleron de unuaj Esperantaj lernolibroj* eldonitaj de D-ro Zamenhof en 1887; pagos malavare. Charles Chomette, 8525 Saturn St., *Los Angeles 35*, Calif., Usono. (39)

*Instruistoj, ĝejnuloj!* Mi bezonas por nacilingve eldonota libro originalajn fabelojn kaj rakontojn el via nacia lingvo. Jozefo Tichy, Ludovĉ nam. 1, *Bratislava*, Ĉeĥoslovakujo. (40)

*Kio estas Socikredito?* 8 p. kun kovrilo. 2 int. resp.-kuponoj aŭ francaj poŝtmarkoj (20 frankoj). — Yelland, *Aspremont* (A.M.), Francujo. (41)

*Kun gesamideanoj el ĉiuj landoj* deziras korespondi 30-jara s-ano Phan van Cáu, 39 Place de Dakao, *Saigon*, Indociĥio.

*19-jara jurista studento* aranĝos kurson venontan vintron. Por konvinki kiel eble plej multajn personojn por Esperanto, li petas alsendon de multaj saluleteroj kaj ilustritaj salutpoŝtkartoj. Li certe respondos. Adreso: Karl-Otto Henze, Georgstr. 23, (23) *Verden a. d. Aller*, brita zono, Germanujo.

*Por varbekspozicio* ni urĝe bezonas materialon: leterojn, ilustr. poŝtkartojn, gazetojn, broŝurojn, presaĵojn. Bonvolu sendi al s-ro Heinz Hamann, Elsässerstr. 55, (23) *Oldenburg*, brita zono, Germanujo.

*Esperanta Grupo Banco di Roma*, Via Bocchetto 4, *Milano*, Italio, ĉiam estas preta korespondi pri demandoj de bankoficistaro vivo kaj pri ĉio rilatanta al bankoj.

*Fraŭlino Tj. Postma,* Weimansweg 50, *Rotterdam Z.*, Nederlando, deziras seriozan korespondadon pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.

*Sendu multe da poŝtmarkoj de via lando!* Vi ricevos samkvale kaj samvalore da danaj poŝtmarkoj. S-ro Vilhelm Michels, *Skodborg J*, Danlando.

*Propagandu Esperanton kun profito!* Ricevinte 3 int. respondkuponojn kaj adresitan koverton, ni sendos pluajn informojn. Esperanto-Grupo *Ansbach (Mittelfranken)*, Friedrichstr. 15, Germanujo.

**Internacia Kristana Frataro**

*sendas senpage* al ĉiu, kiu sendas la afrankon, la jenajn libretojn: *La Evangelio laŭ Sankta Marko*; *La Evangelio laŭ Sankta Johano*; *Biblio-partoj*; *La Kvakerismo* (mallonga raporto); *George Fox* (biografio). — Skribu (preslittere) kaj enmetu poŝtmarkojn (iulandajn) por afranko. — Adreso: Internacia Kristana Frataro, sekretario: Livingstone Jenkins, 21 Mitchell Road, *Palmer Green, London N. 13*, Anglujo. (32)